

Heinrich Heine,
 Milde fluas tra la kor'
tradukita de Valentin Melnikov

Milde fluas tra la kor'
 kanto primavera.
 Flugu, melodi-sonor',
 en la vast' aera.

Flugu longe, sen ripoz',
 super domoj flutu.
 Se troviĝos tie roz' –
 ĝin de mi salutu.

*Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.*

Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)

Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov>. Vidu: <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html>. Vidu ankaŭ: <http://www.esperanto.mv.ru/Melnikov/index.html>.

Heinrich Heine,
 Softe vibras tra l'anim'
tradukita de Kálmán Kalocsay

Softe vibras tra l'anim'
 melodi' tenera,
 flugu al la malproksim',
 kanto primavera!

Flugu al florbeda dom',
 kaj se tie ĉarme
 ridos roz', en mia nom'
 ŝin salutu varme.

*Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kalocajo, *1911 – †1976).*

Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)

El la poezia volumo “Kanzonoj de Heine”.